

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

Koncertoj de niaj rusaj geamikoj okazis en du gimnazioj, kaj unu elementa lernejo "Freinet" (aperis interesa raporto en la gazeto OUEST-FRANCE). Ili ankaŭ kantis en maljunulejo. Sed plej ampleksa programo okazis vendredon 8an de januaro en kunlaboro kun urbaj strukturoj de Hérouville.

La vespero estis organizita kun asocio solidara al Tihvin, ĝemela urbo de Hérouville de post 1991. La rusa vespermanĝo en la kafejo (teretaĝe de la kinejo) arigis 90 personojn, plej multaj ne konataj de ni, sed 60 aliaj personoj ne estis akceptitaj pro manko da seĝoj. Ege efikis la reklamo dank'al la monata kina programo kaj kroma flugfolio kiun "Café des Images" vaste disdonis en la urbaro.

Café des Images estas unu el la du kulturaj kinejoj en Caen/Hérouville. Frekventas ĝin granda publiko. 180 personoj spektis la ironian filmon "la maljunuletoj" de Guennadi Sidorov (2003) kaj preskaŭ ĉiuj (malgraŭ la ĉe ni ne kutime neĝa vetero) restis por aŭskulti la koncerton, denove en la kafejo, ĝis la unua matene. **Vera**, **Inga** kaj **Mikaelo** kantis ruse kaj esperante laŭ muzikaj stiloj tre diversaj, kaj aplaŭditaj. **Vera** kaj **Inga** altnivele kvarmane pianis.

Videble, ĉiuj, klubanoj, kantistoj, kaj spektantoj pasigis tre agrablan momenton.

Bedaŭrinde, ni devis nuligi prezenton en **Granville**, kiun prizorgis **Jeanne Schertzer**, pro aĉa vetero.

La projekto fariĝis sukceso dank'al la senlaca agado de **Gérard Sénécal**, nia prezidanto, de multaj klubanoj, kaj la mona subteno de la normanda asocio.

Kaj kun **Mikaelo Bronstejn** ni jam antaŭvidas prelegturneon en... 2013 !

Yves NICOLAS



ouest
france .fr



En tiu numero :

65a Sat-Amikara Kongreso Hillion.	2
Conférence publique sur les langues.	3
Nia Bulteno tra jaroj. 4	5
Listoj de kotizintoj.	6
Poemo de Catullus.	6

Vera festo estis la kongreso de SAT-AMIKARO organizita de **Esperanto 22** dum Paskaj tagoj.

Mi estis sola reprezentanto de Seine Maritime sed aliaj Normandoj el Calvados kaj Manche ĝin partoprenis.

Hillion estas ĉarma vilaĝo, proksima de maro. Mi do havis plezuron piediri laŭ pado de doganistoj. Bedaŭrinde, somere, tie multege kreskas verdaj algoj. En Hillion ekzistas Centro Georges Palante kiu estas tre taŭga loko por kongresi kun multaj kunvenejoj, spektaklo-ĉambro kaj komuna manĝejo.

Dum la **laborkunvenoj**, ni kompreneble pritraktis temojn kaj aferojn proprajn al la asocio :

Revuo « La Sago », regionaj agadoj por atingi la celojn de la asocio, rilato kun frataj asocioj, estonteco de kulturcentoj (Bouresse kaj Grésillon).

Ĉiuvespere okazis spektakloj :

Sabate, Mervili tradicia bretona muzikilaro de kvar muzikistoj dancigis kongresanojn ; tio estis « Festnoz » ; kun bonega etoso.

Dimanĉe, Lino Markov ludis kelkajn gitarpecojn lia repertuaro fontis el diversaj epokoj. Poste, koruso « Interkant » prezentis : « Ĝeneralan Kanton », koruspoemaro verkita de Pablo Neruda muzikigita de la greko Mikis Theodorakis.

Lunde, Gijomo Armide kantis kaj pianludis siajn proprajn kanzonojn. « La Atendejo » muzika komedio de Georges Lagrange estis la dua spektaklo kreita de la ĥorgrupo de Vannes, nomita « La Maretanoj ». Multe da humuro, suspenso kaj intermiskomprenoj agrabligis tiun komedion.

Konferencoj kaj prelegoj estis tre diversaj :

-Louis Guilloux, la nesubigita (l'Inoumis) : dokumenta filmo pri tiu verkisto el San Briego, engaĝita kontraŭ suferoj kaj maljustaĵoj, amiko de Max Jacob, Camus, Malraux...

- Akvobatalo en Bretonio : diskuto pri protektado de akvo kaj naturaj medioj de fonto ĝis la maro.

- Abeloj en danĝero : En Eŭropo 30 ĝis 40 % de abelkolonioj pereis. La prelegisto klarigis la kialojn de tiu malapero kaj proponis kelkajn solvojn.

- Aganta monda solidareco kontraŭ malsato. Daniel Durand prelegis kaj gvidis debaton

- **Debato kontraŭ la krizoj** : ekonomiaj, financaj, klimataj, sociaj. La debatantoj sugestis elirovojn por ke ni konstruu optimisman estontecon, nin apogante sur alternativaj konkretaĵoj.

Okazis **ekzamenoj** kaj **festivaletoj pri lingvoj** kiu ebligis malkovri la bretonan lingvon. Kaj kelkaj pretendas ... ke Esperanto ne estas kultura lingvo !!!

Ekskursoj estis variaj : Vizito de San Briego, de brikejo, de mitulbredejo en la golfeto,

Dum mardaj tuttagaj ekskursoj eblis promeni okcidenten « sur la spuroj de la gaŭloj » (Trégastel, Pluezek, Paimpol, insulo Bréhat) aŭ orienten (Dinan, rivero Rance, abatejo en Léhon)

Libro-servo de SAT Amikaro kaj **disco-servo** Vinilkosmos proponis multajn librojn kaj diskojn al kongresanoj

Rodica Todor invitis partoprenantojn veturi al Braŝovo (Rumanio) kie okazos de la 1a ĝis la 6a de Aŭgusto la tutmonda kongreso de **SAT**. Ŝi montris al ni belegajn kaj allogajn bildojn pri Rumanio, kaj pri ŝia urbo Braŝovo

La kongreskomitato el Sète prezentis la venontan IREM (Internacia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo) dum kiu okazos SAT-Amikara kongreso de la 22a ĝis la 26a de Aprilo 2011, kune kun la aliaj francaj esperantistaj asocioj (Esperanto-France, Fervojistoj, Katolikoj kaj aliaj...).

Tiu kongreso en Hillion kunigis pli ol 200 homojn. Ĝi estis perfekte organizita. La kongres-libro estis tre preciza. Mi estas tre dankema al OKK (Organiz Kongreskomitato).

Kaj mi gratulas ilin pro la laboro farita.

Dum monato Majo 2010, mi ankaŭ partoprenos Franc-Germanan kongreson en la urbo **Kaiserslautern**. Mi esperas ke ĝi same kontentigos min.

Petro KIJO

* **Saint Briec**



« J'ai eu le mois dernier l'occasion d'intervenir, alors que j'assistais à Rennes à une conférence sur les langues en Europe. Une expérience qui peut être utile à chacun d'entre nous : comment argumenter le plus efficacement pour l'espéranto, en un temps très court. J'aimerais donc vous la faire partager, ça peut toujours servir.

J'avais appris le jour-même, en lisant Ouest-France, qu'avait lieu le soir à la fac de droit de Rennes une conférence-débat sur le problème linguistique en Europe. Elle serait sûrement fort intéressante, mais le risque était grand qu'aucun espérantiste n'y assiste et donc que le mot Espéranto risque (encore une fois) de ne même pas être prononcé. J'ai donc jugé qu'il fallait y aller.

Le conférencier s'appelait Mark Wise, un universitaire britannique, parlant parfaitement le français, et fort sympathique au demeurant. Le public : une centaine de personnes, principalement des étudiants. Il a très correctement exposé la situation des langues en Europe, et le problème de la domination de l'anglais. Il l'a presque aussi bien exposé que ne l'aurait fait un espérantiste... Il était sur la bonne voie, manquait plus qu'un petit quelque chose...

Lors des questions/réponses, j'ai eu l'occasion de pouvoir m'exprimer par deux fois. Je vous livre donc l'argumentaire que j'ai développé, dans le temps minimal qui m'était imparti. La plupart des arguments sont classiques pour la plupart d'entre nous, le problème étant juste de sélectionner les meilleurs arguments vis-à-vis du contexte, et de les enchaîner logiquement pour arriver à notre conclusion évidente...

- Pourquoi l'anglais est langue internationale ? A toutes les époques, la langue internationale était celle de la puissance dominante. Il y a 2000 ans, à l'époque de l'empire romain, c'était le latin. Au 20ème siècle, la langue dominante était l'anglais, la langues des Etats-Unis (le sera-t-elle encore au 21ème siècle...).
- *Si l'anglais est la langue dominante, c'est donc pour des raisons politiques et en aucun cas linguistique. L'anglais n'est pas une langue facile, plus on avance plus on s'en aperçoit, et sur un plan purement linguistique, elle n'a strictement rien d'international. C'est quand même probablement l'une des seules langues dans le monde dans laquelle le A ne se prononce pas A, le E pas É, et le I pas I, etc.*
- Les parents veulent que leurs enfants apprennent l'anglais. Ils se foutent que leurs enfants apprennent une langue étrangère, il veulent juste qu'ils apprennent l'anglais, car c'est plus qu'une simple langue vivante, c'est la langue internationale de fait, et à ce titre c'est un passeport social et professionnel. Elle a donc un statut tout à fait spécifique, elle est considérée comme indispensable, et c'est tout à fait compréhensible (dans la mesure où ces gens ne connaissent pas l'espéranto). Ce qui est regrettable, bien sûr, c'est que ça entraîne un désintérêt pour les autres langues, et finalement pour le principe même de l'apprentissage des langues en général.

Conférence publique sur les langues en Europe:

Ils considèrent qu'elle est parlée partout, ce qui n'est que très partiellement vrai. Si l'on veut être précis, l'anglais n'est pas la langue la plus parlée dans le monde, par contre c'est clairement la langue la plus enseignée partout, et de loin. Donc, quand on s'adresse à quelqu'un au hasard à l'étranger, on n'est pas certain qu'il la parlera vraiment, mais au moins on sait qu'il l'a apprise.

- L'anglais est loin d'être vraiment parlé partout. Les gens qui visitent le Japon sont toujours sidérés de découvrir qu'en fait, on n'y parle pas l'anglais. Ils sont convaincus que parce que c'est un pays moderne et technologique, alors on y parle massivement l'anglais. Ce n'est pas le cas.
- *En fait, l'anglais est vraiment difficile pour eux, et c'est pareil pour les chinois. Si les gens dans les pays d'Europe du Nord ont un excellent niveau d'anglais, on sait que c'est d'abord parce que le doublage est peu répandu dans ces pays, et ils ont l'habitude de voir quotidiennement des films ou des séries américaines avec des sous-titres. Mais ce n'est pas la seule raison. La principale raison, c'est la proximité linguistique de leurs langues avec l'anglais, qui fait que pour eux, l'anglais est particulièrement facile à maîtriser. Et à l'inverse, pour les pays d'Europe du Sud, c'est plus difficile. Et en pratique, les niveaux d'anglais ne sont pas meilleurs en Espagne ou en Italie que chez nous.*
- En Europe, le principe officiel d'égalité des langues existe et est appliqué, mais dans les faits, il ne l'est ni partout ni tout le temps. Et la situation a tendance à s'aggraver. Il y a contradiction entre ce principe officiel et la réalité du terrain qui fait que l'anglais tend à être la langue de travail unique dans les institutions européennes, et même souvent la seule langue de communication avec le public, comme c'est souvent le cas sur les sites web institutionnels européens.
- *Or, le problème, c'est que le fait d'utiliser l'anglais comme langue unique est fondamentalement contraire au principe d'égalité des langues, et plus on systématise l'usage de l'anglais plus on détruit ce principe d'égalité des langues. Les deux sont strictement incompatibles, et plus l'anglais devient langue unique, moins les autres langues sont égales.*
- Le problème des langues en Europe est donc complexe et à peu près insoluble. On a beau y réfléchir, en discuter, tourner le problème dans tous les sens, il n'existe pas de solution.

.../...

Paĝo 4a

Enfin, si... il y en a une, mais elle est souvent rejetée d'office, sans jamais être vraiment étudiée. C'est d'utiliser en plus des autres langues une langue neutre et qui ne soit pas celle d'un des pays. Et actuellement, il n'y a à peu près qu'une seule langue qui corresponde à ces critères, c'est l'espéranto.

Certains balayent l'option en 2 secondes en sortant des trucs du genre : l'espéranto est une langue artificielle ou une langue sans culture. En général, ils sortent ça comme ça, mais ils ne connaissent rien du sujet. Ce soir, en rentrant chez vous, tapez Espéranto sur Google, vous serez surpris du nombre de pages. Vous connaissez Wikipedia sur Internet ? L'espéranto est au 22ème rang dans la liste des langues utilisées, avec plus de 100 000 pages, ce qui le place même devant plusieurs autres langues officielles européennes. En plus, et c'est fondamental, l'espéranto est une langue particulièrement facile à apprendre.

• C'est un phénomène qui monte et qu'il faut peut-être ne plus ignorer. Parmi les députés européens, il y en a plusieurs qui connaissent l'espéranto, et il y en a même une qui a fait une proposition officielle dans ce sens la semaine dernière.

Voilà, tout ça énoncé à peu près dans ces termes, en gros sur deux interventions de 2 à 3 minutes chacune, la deuxième intervention ayant servi essentiellement à caser les arguments que j'avais oubliés dans la première. Heureusement, je n'ai pas eu de problèmes à pouvoir intervenir une deuxième fois, la première s'étant bien passée.

Heureusement, il n'y avait pas beaucoup de volontaires pour le micro. J'ai eu de la chance de pouvoir finalement m'exprimer aussi longtemps.

Quelques conseils :

• Si vous êtes au courant qu'a lieu une conférence ou un débat sur le problème des langues, et si vous n'avez pas peur de parler en public, allez-y. Il serait regrettable que le problème soit décrit dans le détail mais finisse comme trop souvent en queue de poisson, simplement parce que personne n'a évoqué la solution Espéranto.

• Bien évidemment, il ne faut pas se comporter comme un fanatique ou un agité. Éviter toute forme d'agressivité. Un minimum de sérieux et de calme s'impose. Astuce : soyez en accord avec le conférencier, ne le contredisez en aucun cas. Vous aurez son approbation (des hochements de tête bien visibles) et donc aussi celle des gens qui l'ont invité, et à la fin, tout le monde est content.

N'attaquez pas par l'espéranto dès la première phrase. C'est une conclusion, donc à réserver au dernier tiers de votre intervention. On ne peut pas présenter une solution à des gens qui n'ont pas identifié de problème, de même qu'on n'apporte pas une réponse à une question qui n'a pas été posée. Il faut donc être factuel, et si les présents ont l'impression d'avoir, grâce à vous, appris quelque chose ou ont pris conscience de détails qui leur avaient échappé jusqu'alors, c'est d'autant plus positif.

• *Sélectionnez les arguments les plus pertinents. Le temps est extrêmement limité. Inutile donc de parler du pape ou de Michael Jackson, c'est anecdotique et ça ne s'insère pas dans le déroulement logique de l'argumentaire.*

• N'utilisez que des arguments exacts, c'est une question de déontologie. Inutile de véhiculer des rumeurs (cf. lire absolument « Esperanto sen mitoj »)

• *Si vous êtes linguiste, professeur de langue, traducteur, présentez-vous comme tel. Même si ça ne fait en rien de vous un spécialiste, pour les autres c'est un gage de sérieux et de compétence (je me suis d'abord présenté comme traducteur, et je suis devenu involontairement une référence presque officielle pour le conférencier, d'autant plus que j'argumentais dans son sens, c'est du gagnant-gagnant)*

• Inspirez vous d'Obama : essayez si possible de passer juste après l'intervention d'un spectateur bien nul, vous aurez l'air d'autant plus génial (le gars qui a posé sa question avant moi était incompréhensible, au bout de 10 secondes tout le monde avait envie de l'achever à la machette)

• *Prévoyez une petite liasse de « kalendaroj », soit à donner au conférencier à la fin, soit à distribuer au public à la sortie (attention, c'est difficilement possible de faire les deux, j'ai choisi la première option et avant de quitter les lieux, j'ai déposé les « kalendaroj » à l'endroit adéquat du hall de la fac, j'espère que des « klubanoj » locaux viendront recharger de temps en temps).*

Depuis, le conférencier m'a invité dans son blog perso sur les langues. »

Philippe BERIZZI

Texte tiré d'un courriel de « UFE-Debatoj » :

ufe-debatoj@yahoogroupes.fr

Mardi 24 février 2009.

« Comment introduire l'espéranto à l'occasion d'une conférence publique sur les langues »



FOLIUMANTE nian REGIONAN BULTENON tra JAROJ -4-

Bulteno n° 32a Oktobro 1955	3 paĝa	Ek de nun la bulteno estas presata sur verda papero. Nombro de la kotizintoj de 1947 ĝis 1955. 1947 : 98 . 1948 : 128 . 1949 : 136 . 1950 : 135 . 1951 : 122 . 1952 : 117 . 1953 : 105 . 1954 : 108 . 1955 : 111 .
n° 36a Junio 1956	2 paĝa	25a kongreso en Rouen, 5an de majo 1956. Prezidanto Sro Bosc, Vicprez. : Sroj Huet kaj Duthilleul, Sekretariino Fino Fercoq, Kasistino : Sino Letendre. Fino Montagné ne plu zorgos pri la bulteno, sed ek de nun Sro Huet.
n° 37a Septembro 1956	2 paĝa	Sud Normanda kongreseto : 24an de julio 1956 : 20 partoprenintoj.
n° 40a Junio 1957	2 paĝa	26a kongreso en Caen : 4-5an de majo 1957. Prezidanto : Sro Duthilleul (Caen), Vicprez. : Sroj Huet, Pottier. Sekretariino : Fino Chérie. Kasistino : Sino Letendre. Honorprezidanto : Sro Bosc.
n° 45a Junio 1958	5 paĝa	La kotizo iĝas 2 Fr. - 27a kongreso en Le Havre. 17-18an de majo 1958 (130 partoprenantoj). Prezidanto : Sro Huet. Vicprez. Sroj Pottier, Duthilleul. Kasistino : Sino Letendre. Sekretario : Sro Mammaux. - Inaŭguro de strato Zamenhof. Sro Mammaux zorgos pri la bulteno.
n° 46a Oktobro 1958	5 paĝa	Redaktas Sro Mammaux. Artikolo de Huet pri neŭtraleco de UNE en la Franca.
n° 47a Decembro 1958	3 paĝa	Sro Bosc ricevas Ordenon « Mérite Touristique ».
n° 49a Aprilo 1959	5 paĝa	Demandaro al ĉiuj izolitaj normandaj esperantistoj.
n° 50a Junio 1959	6 paĝa	28a Kongreso en Evreux. 2an de majo 1959. (76 partoprenintoj). Prezidanto : Sro Huet, Vicprez. : Sroj Pottier, Saperas. Sekretario : Sro Mammaux. Kasistino : Letendre. Membroj : Finoj Chérie, Montagné, Sroj : Féret, Véron.
n° 51a Oktobro 1959	8 paĝa	Anoj de UNE : 140.
n° 55a Julio 1960	4 paĝa	29a Kongreso en Domfront. 14-15an de majo 1960. Prezidanto : Sro Huet. Vic- prez. : Sroj Pottier, Saperas. Sekretario : Sro Mammaux. Kasistino : Letendre. Konkurso : « Campagne de recrutement 1960-61. » - 507a membro de UNE.
n° 56a Novembro 1960	5 paĝa	Redaktas Sro Huet. - 1a de Novembro : 541a membro de UNE.
n° 57a Januaro 1961	3 paĝa	Redaktas Sro Bosc. Normandaj pioniroj (kun fotoj). Sroj : Saget, Strub, Gasse, Dubuisson, Truffart, Parrington.
n° 58a Aprilo 1961	5 paĝa	Redaktas Sro Hannier. 554a aliĝilo al UNE. Cirkulero de Sro Llech Walter por aliĝi al UFE.
n° 59a Julio 1961	6 paĝa	Prezidanto : Sro Huet. Sekretario : Sro Véron. Kasisto : Sro Colleu. Bultenisto : Sro Hannier. - 30a kongreso en Les Andelys 6-7an de majo 1961. Sro Guillaume dum Ĝenerala Kunveno petas ke ĉiu normando aliĝu al UFE. Sro Bosc kontraŭ- staras. Prezidanto : Sro Huet. Vicprez. : Sroj Saperas, Pottier. Kasisto : Sro Colleu (Evreux). Sekretario : Véron. Bultenisto : Sro Hannier. Propagandisto : Sro Quillaud. Helpkasisto : Sro Vilette (Evreux). Helpsekretario : Sro Chamaret. Membroj : Sro Mammaux, Letendre.
n° 60a Oktobro 1961	4 paĝa	Franclingva alvoko al izolitaj kaj novbakitaj esperantistoj.
n° 64a Julio 1962	8 paĝa	31a kongreso en Rouen, 5-6an de majo 1962.. Speciala kunveno de UFE- membroj kun Sro Guillaume kiu petas aliĝon de ĉiuj membroj al UFE. Prezidanto : Sro Huet. Vicprez. : Pottier, Saperas. Sekretario : Sro Quillaud. Help- sekr. : Sro Chamaret. Kasisto : Sro Jouis. Helpkasisto : Sro Vilette. Bultenisto : Sro Hannier. Propagandistoj : Sroj Loisel, Mammaux, Véron. - Franclingva artik- olo de Sro Jouis pri UNE.
n° 65a Oktobro 1962	8 paĝa	23-24an de junio 1962, kunveno en Vire : 22 personoj.
N° 67a Aprilo 1963	10 paĝa	La estraro decidas : kongreso ĉiu dua jaro. Franclingva artikolo. Artikolo dulingva : en Venezuelo (por komencantoj). La kongreso (3a en Caen ne okazos).

ESPERANTO - NORMANDIE

Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures



Listo de kotizintoj por 2009

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba listo : Ge-Sinjoroj :

BADMINGTON, BATAILLE, BESSIERE, BONNET, CARON, CHALM, COLBERT, COLOMBEL, DEFRANCE, DUBOIS, DUBUC, DUFEU, DUFRESNE, DUFOSSE, DUVAL, ERHARD, EVRARD, FRESLON, GASCOIN, GIBERT, GUEROULT, GUERRE, GUILMOT, GROULT, HELBERT, HUBERT, JOURDAINE, JOUVIN, KLEIN, LANGEAIS, LARDEUR, LEBRETON, LEBRUN, LECOUVREUR, LEGUILLON-DECOSSE, LELOUEY, LEMARCHAND, LEMELTIER, LEPREVOST, LEROY, LESUEUR, LEVESQUE, LEVY, LOISEL, LONGUET, MAGEREL, MARIE, MICHAUD, MILLET, NARDIN, NICOLAS, PAUMIER, POTTIER, QUILLAUD, RAUCH, ROBIOLLE, ROLLAND, ROUSSEAU H., ROUSSEAU J., SCHERTZER, SENEAL, SERY, TAILPIED, TANGUY, TURMEL, ZILLIOX.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN** : 8 Eŭroj por 2009.

Listo de kotizintoj por 2010


Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba unua listo : Ge-Sinjoroj :

BESSIERE, CARON, CHALM, COLBERT, COLOMBEL, DEFRANCE, DUBOIS, DUFEU, DUFRESNE, EVRARD, GASCOIN, GIBERT, HELBERT, JOUVIN, JEHENNE-LEDUAN, LARDEUR, LEBRUN, LECOUVREUR, LEMELTIER, LEMARCHAND, LEONARD, LEPREVOST, LESUEUR, LOISEL, MAGEREL, MARIE, MAURAU, MICHAUD, NARDIN, NICOLAS, PAUMIER, POTTIER, QUILLAUD, ROBIOLLE, ROLLAND, ROUSSEAU H., ROUSSEAU J., SERY, SCHLÜTER, THIERRY, ZILLIOX.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**

Abon-kotizo por 2010 : 8 Eŭroj, kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine. (Tel. 02.35.34.28.78).



Se vi konas Internet-adreson de geesperantistoj kiuj ŝatus ricevi nian modestan bultenon, vi bonvolu ĝin sendi al ni, aŭ instigu ilin sendi al ni la informon. Se via Internet-adreso sangus, ne forgesu sendi al ni la novan. Antaŭdankon.

« CATULLUS AD CENAM FABULLUM INVITAT »

Ĉe mi Fabullus manĝi mi morgaŭ cin invitas
Se kunporti nutraĵon, abunde ci bonvolas,
Kun ankaŭ bonan vinon kaj belan junulinon,
Miaflanke mi provizos bonhumoran amikecon.

Pli fari mi ne povas, ĉar ve en miaj poŝoj,
Ne estas ormoneroj sed nur araneaĵoj.
Tamen mi cin kore donacos, iom de la sorĉa parfumo
Kiu certe Venuso mem, kreis por mia amatino.

Kiam ci estos ĝin flarinta ci preĝpetegos ke la dioj
Tute transformu cian korpon en nur amaso da nazegoj !

Catullus : latina poeto de la unua jarcento A.K.

Poemo tradukita de **Henri ROUSSEAU**.